



Balenido

Mardo, la 5-a de julio 2016

N-ro 4

La solena inaŭguro

Solena inaŭguro de BET-52 okazis dimanĉe la 3-an de julio je la 15-a horo en ĉefa salono de la Urba Kulturcentro (Jaunimo str. 4).



La prezidanto de la organiza komitato de BET kaj prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas prezentis la oficialajn gastojn.

Post lia enkonduka parolado eksonis Himno de Esperanto kaj legado de salutmesaĝoj de la Alta Protektanto de BET, la ĉefministro de Litovio Algirdas Butkevičius en la litova kaj en Esperanto.



La paroladon de la urbestriino Nijolė Dirginčienė tradukis Gražina Opulskienė.

Programo

La 6-a de julio (merkredo)

- 08.00 – 09.00 **Matenmanĝo** (Manĝejo)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato**. Prof. Aloyzas Gudavičius: Prelegciklo pri la litovaj lingvo, kulturo, historio (Ĉefsalono)
- 09.00 – 10.00 **Somera Universitato**. Prof. Ilona Koutny: “Ĉu facila lingvo facile lerneblas?” en salono de la gastejo “Birštono tulpė” (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo)
- 09.00 – 10.00 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 10.00 – 10.45 **Somera Universitato**. Prof. Giorgio Silfer: Centralismo aŭ feder(al)ismo? Alternativa modelo por Esperantio, la 1-a parto (Ĉefsalono)
- 10.45 – 12.15 **Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj** en klasoj de la urba gimnazio (Kęstučio str. 29).
- 11.00 – 10.45 **Somera Universitato**. Prof. Giorgio Silfer: Centralismo aŭ feder(al)ismo? Alternativa modelo por Esperantio, la 2-a parto (Ĉefsalono)
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato**. Anna Striganova: Dronintaj urboj, realaj kaj fabelaj (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 12.00 – 12.45 **Somera Universitato**. Bernard-Régis Larue: Prelego pri mirindaj satelitoj de Saturno (Ĉefsalono)
- 13.00 – 14.00 **Tagmanĝo** (Manĝejo)
- 14.30 – 15.15 **Somera Universitato**. Prof. Aleksandr Melnikov: Kiel instrui tedaĵon distre (el ŝparporketo de Esperanto-instruisto)? (Ĉefsalono)
- 14.30 – 15.15 **Prelego**. Dima Ŝevĉenko: Elektronikaj libroj en Esperanto (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo)
- 15.30 – 16.15 **Somera Universitato**. Ed Robertson: Duolingvo, la senpaga lingvolernilo (str. Birutės 21, sur la tria etaĝo).
- 15.30 – 16.15 Prof. Giorgio Silfer prezentas la libron *Historio de Esperanta literaturo* (Ĉefsalono)
- 15.30 – 16.15 **Horo kun la aŭtoro**. Mikaelo Bronštejn prezentas freŝeldonitajn librojn, novajn poemojn kaj kantojn (str. Birutės 19, la dua etaĝo)
- 18.00 – 19.00 **Vespermanĝo** (Manĝejo)
- 20.00 – 21.00 **Koncerto de ĴomArt kaj Nataŝa** (Kurhauzo)



Sekvis salutmesaĝo de la prezidanto de UEA Mark Fettes (legis Barbara Piterzak).



Tre impresaj estis rememoroj de Biruta Rozenfelde, la ĉeforganizanto de la unua BET en 1959 ĉe la latvia ĉefurbo Riga (tiam studentino Biruta Kondrate), apud la lago Lielais Baltezers.



Ĉeestantojn de la solena inaŭguro sekve salutis Prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio Tonu Hirsik kaj Prezidanto de Latvia Esperanto-Asocio Margarita Želve.

Post la oficiala parto okazis Nacia Vespere kun koncertoj de la urbaj popolmuzikaj ensembloj Lendrunas kaj Raskila (legu pli en *Balenido* n-ro 2).

Walter Želazny

Profesoro Želazny havos dum BET prelegserion pri judaismo.


Želazny naskiĝis en 1950 en Rzeszów. Li estas sociologo kaj okupiĝas pri etnismo, kultura antropologio, socilingvistiko kaj zamenhofologio, pri kiuj li publikigis kelkajn sciencajn librojn kaj plurajn studojn en la lingvoj pola, franca kaj Esperanto. Nun li estas profesoro pri sociaj sciencoj de la Bjalistoka Universitato kaj estro de la katedro pri kultura antropologio. Esperantisto ekde 1968, Želazny estis estrarano de TEJO (1976–77), vicprezidanto de la legenda Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK, 1979–1981) kaj la unua Konsulo de la Esperanta Civito (2001–2006). En BET-52 li prelegos pri temo, kiun li mem prezentas jene:



Zamenhof strebis iusence ligi la akvon kun la fajro. Neniu katoliko kaj neniu judaisto en la epoko de Zamenhof imagis, ke eblas krei iun platformon de religia interkompreniĝo. Nur post la Dua Vatikana Konsilio venas ideo pri la ebleco interparoli (nenio pli) inter judoj kaj kristanoj (antaŭe la Dua Konsilio formetis la akuzon pri la murdo de Jesuo fare de judoj).

La proksimiĝo ideo, religia kaj filozofia venis en la tempo de la papo Johano-Paŭlo II, kiam li anoncis, ke judoj “estas niaj pli aĝaj fratoj”. Tiuj vortoj vekas ĝis nun teologiajn diskutojn, sed ili estas eble la plej gravaj en la tuta historio de la rilatoj inter judoj kaj kristanoj.

Zamenhof antaŭ pli ol cent jaroj iusence esprimis similan konvinkon en sia Hilelismo. Dum la prelegoj mi prikonsideros tiun aspekton de lia penso. Sume, celo de la prelegoj estos proksimigi al la aŭskultantoj ĉefajn religiajn ideojn de Zamenhof, ĝis nun ne komprenataj, kaj prikonsideri, ĉu iam eblos tio, kion li religie celis, do proksimiĝo de diversaj konfesioj. Ni ne forgesu, ke la lastan etapon de sia kreopova vivo (antaŭaj: la lingvo Esperanto, Hilelismo/Homaranismo) Zamenhof ne sukcesis realigi pro la eksplodo de la Unua Mondmilito. Ĝi koncernis unuigon de religioj.





Giorgio Silfer

Profesoro Silfer prezentos i.a. la verkon *Historio de la Esperanta literaturo*.

Giorgio Silfer estas pseŭdonimo de Valerio Ari, kiu naskiĝis en 1949 en Milano. Li estas lingvoinstruisto, organiza

konsilisto, verkisto kaj publicisto, doktoro pri modernaj lingvoj (1982) kaj beletristiko (1987). Li kunfondis la revuon *Literatura Foiro* (1970) kaj redaktis ĝin ĝis 1980. Ĉe la 36-a IJK en 1980 Giorgio Silfer, kune kun Jouko Lindstedt kaj Amri Wandel, lanĉis la Manifeston de Raŭmo.




En 1991 li kunfondis la Esperanto-Centron de PEN-Klubo Internacia, en kies mondkongreso (1993) li sukcesis, kun sia edzino Perla Martinelli, atingi la agnoskon de Esperanto kiel literatura lingvo. En 1996 li estis inter la ĉefaj subskribintoj de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj. Unu el

la ĉefaj iniciatintoj de la Esperanta Civito kaj ĝia konsulo (2007-2011). Aŭtoro de tri poemaroĵoj, pluraj teatraĵoj, romano, diversaj literatursciencaj kaj interlingvistikaj verkoj.

Silfer kontribuos al BET-52 per enkonduko al diskuto “Centralismo aŭ feder(al)ismo? Alternativa modelo por Esperantio”, plene kongrua al la ĉeftemo, nome studi problemojn de la Esperanto-komunumo, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperantagado, interŝanĝi spertojn pri esperantista laboro. Giorgio Silfer gvidos al konciza analizo pri la fenomeno Esperanto laŭ historiografia kaj sociologia aliroj, ĝis la komparo de la du organizaj modeloj kiuj karakterizas Esperantion.

“La du modeloj diverĝas ĝuste ĉar la aliroj ne koincidas”, – diras Silfer. – “Unu linio kondukas al centralisma modelo, la alia al federisma. Kaj estas rimarkinde, ke federismo estas minoritata fenomeno en Eŭropo, kvankam ĝi naskiĝis ĝuste en ĉi tiu kontinento, kie ĝi estis miskomprenata kaj eĉ perversie aplikata en iama Jugoslavio kaj en Sovetunio”.




Por plene sekvi la diskuton Giorgio Silfer preparis du resumajn paĝojn en *Heroldo de Esperanto*: ili estas

riceveblaj en pdf-formato, mendante ilin ĉe civito@esperantio.net (senpage por BET-aliĝintoj, libera donaco al la UEA-konto LFOI-I por la ceteraj).

Dum BET prof. Silfer prezentos i.a. la verkon *Historio de la Esperanta literaturo*, verkitan kun Karlo Minnaja, kiu baldaŭ atingos la trian preson (aŭ duan eldonon). Eblos interparoli kun li kaj lia edzino, d-ino Perla Martinelli, pri multaj temoj lige kun la originala Esperanto-kulturo.

(La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2016/04/bet-38/>)



Venu al kunveno de katolikaj esperantistoj!



La 10-an – 11-an de septembro 2016 okazos en Panevėžys la 2-a kunveno de litovaj katolikoj-esperantistoj. La organizantoj preparis riĉan programon: sanktaj mesoj en la plej belaj preĝejoj de la urbo,

sakralaj koncertoj, kelkaj ekskursoj, riĉenhavaj prelegoj pri la katolika Esperanto-movado, ekspozicioj de artaj laboroj de Panevėžys-aj esperantistoj. La partoprenantoj loĝos en la hotelo Pervaža.

Dum BET-52 eblas aliĝi, la aliĝiloj troveblas en la akceptejo. Tie oni povas trovi ankaŭ la antaŭviditan programon. Ĉiumatene 9.00 – 10.00 en la akceptejo deĵoras iu el la organizantoj. Bv. transdoni plenigitan aliĝilon al ili, aŭ al la aŭtorino:

Vida Kulikaŭskiene

Duontagaj migradoj

Se ne estos pluvego aŭ fulmotondro, mi planas migri tra la ĉirkaŭaĵo:

- lundon post la tagmanĝo mi intencas kapti la pramon je 14.00, se ne estos aliaj proponoj
- vendredon je 10.00, verŝajne al la direkto de Prienai (ne nepre atingante ĝin). Mi ĝojas je kunirontoj!

Reinhard Pflüger



Konatiĝu: Anna Striganova

**Anna Striganova
prelegos pri fabeloj
en diversaj lingvoj,
landoj, pri fabelaj
urboj...**



Anna naskiĝis en Moskvo, en 1987. Esperantistiĝis en 2008. Ŝi estas magistro pri filologio, laboras ĉe filologia fakultato de Rusia Universitato de Amikeco de Popoloj (RUDN), okupiĝas pri esploroj de literaturo, mitoj kaj fabeloj, estas aŭtoro de pluraj sciencaj artikoloj. Anna verkas ankaŭ beletron en la rusa kaj origine en Esperanto. Kelkaj ŝiaj libroj trafis furorlistojn de Libroservo de UEA. Anna ofte prelegas en Esperanto kaj en la rusa dum sciencaj konferencoj, Esperanto-renkontiĝoj kaj Lingvaj Festivaloj. Kune kun Dmitrij Ŝevĉenko ŝi nuntempe gvidas universitatan kurson de Esperanto kaj aktive kunlaboras en Esperanto-eldonejo “Impeto”.

Fabelo estas la plej antikva ĝenro de la homa mondo. Tamen herooj kaj motivoj de popolaj fabeloj atingis nian epokon preskaŭ senŝanĝe. Ŝanĝiĝis nomoj kaj dekoracioj, sed moralo, psikologiismo, filozofaj sencoj de fabeloj, kaŝitaj sub facilaj formoj venis en la 21-an jarcenton tiaj, kiaj ili estis dekojn da jarcentoj antaŭe. Antikvaj fabelaj motivoj sukcese trovis taŭgan lokon en diversaj sociaj situacioj, en diversaj historiaj epokoj en kanonoj de diversaj religioj – kaj paganaj, kaj monoteismaj.

Dum jarcentoj geavoj rakontis al genepoj fabelojn – tio estis kutimo, kvazaŭ spirado aŭ manĝado. Nur en la 19-a jarcento popolaj fabeloj iĝis materialo ne nur por rakontado aŭ kolektado, sed ankaŭ por sciencaj laboroj de filologoj kaj historiistoj. Epokon de romantismo en multaj landoj de Eŭropo markis granda intereso pri pasinteco, pri naciaj radikoj kaj vojoj de popoloj. Tiu tendenco revivigis intereson pri fabeloj kiel la plej antikva kaj riĉa fonto de naciaj kulturoj. Post longaj jaroj de lernado kaj kolektado evidentiĝis, ke multaj fabelaj motivoj kaj herooj preskaŭ sendiference aperas en fabeloj de diversaj popoloj. Sciencistoj decidis, ke



tio estas frukto de komunikado inter popoloj. Aperis tielnomataj sciencaj skoloj de prunto, kies sciencistoj penis trovi la bazan fabelon, poste pruntitan de aliaj popoloj. Tiuj esploroj donis iujn rezultojn, sed tute perdis sencon, kiam la “samaj motivoj” estis trovitaj en fabeloj de originaj popoloj de Ameriko, de Japanio, de Ĉinio, de afrikaj popoloj. Naskiĝis dekoj da nesciencaj teorioj, intereso al fabeloj de tago al tago grandiĝis. Kiam la ondo de tiuj superstiĉoj finfine estingiĝis, restis klara, tute scienca kaj ĝis nun aktuala teorio, ke sen iu ajn fizika ligo, sen iuj pruntoj, la samaj fabelaj motivoj naskiĝis el ordinara homa vivo: el amo al vivo kaj timo antaŭ morto, el rilatoj kun naturo kaj bestoj, el seksa diverseco, el maturado de homo kaj popolo – do el tiuj eroj de la homa vivo, kiuj samtempe estas bazaj por ĉiu homo, en ĉiuj epokoj, en ĉiuj landoj.

En la 20-a jarcento la valoron de popolaj fabeloj rimarkis psikologoj: graveco de “samaj motivoj”, nomitaj “arketipoj” kaj ties bona kompreno estis anoncigitaj kiel unu el bazoj de psika sano. Manko de unu el tiuj “arketipoj” do kaŭzas diversajn fobiojn kaj kompleksojn.

Ne apartenante al iu ajn kultura epoko, historie liberiĝinte de iu ajn religio, profunde homecaj, naskite el la plej bazaj kaj sinceraj homaj scioj kaj emocioj, fabeloj facile estas komprenataj de ĉiu homo en ĉiu loko de la mondo kaj ĉiam aktualas kaj gravas. Tiel, fabelo estas lingvo – simbola lingvo, helpe de kiu homo povas facile komuniki en la limoj de eternaj, facilaj, esence homecaj temoj.



**Grava anonco pri la tuttaga
ekskurso ĵaŭde 07 jul 2016**

**Forveturo je la 08.30 h de la akceptejo
(B. Sruogos str. 9)**

Ĉu vi volas kontribui al *Balenido*?

Bonvolu verki kaj meti viajn artikolojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendi ilin rete, se eble kun fotoj, al:
stano.marcek@gmail.com

Stano Marček, via redaktoro